

Publika raporto pri la KER-ekzamenoj en 2014

2014 estis laŭkalendare en la sesa ekzamenjaro, sed fakte kiel plena jaro nur la kvina. En 2014 okazis entute 8 memstaraj ekzamensesioj kaj unu tutmonda sesio kun 17 ekzamenlokoj. Entute en 25 urboj de 17 landoj estis eblo trapasi KER-ekzamenojn en 2014.

1.	Antverpeno (BE)
2.	Florianopolo (BR)
3.	Kalio (CO)
4.	Ronda (ES)
5.	Greziljono FR
6.	Tutmonda sesio en 17 lokoj (FR 3), RU (2) CN (2), MX (2), AR, BR, CH, CO, JP, KR, NI, NL
7.	Nitra (SK)
8.	Viktorio (CA)
9.	Bonaero (AR)

En la 17 ekzamenlokoj okazis 291 *ekzamenokazoj*¹

	B1S	B1P	B1K	B2S	B2P	B2K	C1S	C1P	C1K	Összesen	
1 Antwerpen	0	1	2	0	1	2	0	4	6	16	
2 Florianopolo	5	2	2	0	0	3	0	2	4	18	
3 Baugé en Anjou	0	2	4	0	3	11	0	3	4	27	
4 RONDA (Malaga)	0	1	3	0	2	4	1	0	4	15	
5 Kalio	0	0	0	0	1	1	0	2	0	4	
6 La Chaux-de-Fonds	2	1	2	1	0	2	0	0	1	9	
7 Seulo	12	0	0	6	0	0	3	0	0	21	
8 MOSKVO	6	0	0	2	0	0	2	0	0	10	
9 Limoĝo	0	1	2	2	0	0	2	0	1	8	
10 Den Haag (Hago)	1	0	0	0	0	0	4	0	0	5	
11 Managvo	2	0	0	2	0	0	0	0	0	4	
12 Ĉeboksaro	0	0	0	2	0	0	2	0	0	4	
13 Parizo	1	0	0	3	0	0	3	0	0	7	
14 Kuritibo	0	0	1	4	0	3	0	2	1	11	
15 Tecámac	5	3	0	1	2	0	1	1	1	14	
16 Bonaero (Buenos Aires)	1	0	0	2	0	0	2	0	0	5	
17 ARRAS	4	0	0	1	1	4	1	0	0	11	
18 Osaka	1	0	0	2	0	0	2	0	0	5	
19 Bogoto	6	0	0	6	0	0	4	0	0	16	
20 Monterrey, Nuevo León	4	0	0	0	0	0	0	0	0	4	
21 Tianjin	8	0	0	11	0	0	0	0	0	19	
22 Zaozhuang	9	0	0	2	0	0	0	0	0	11	Össz. 164
23 Viktoria	0	0	3	1	0	0	0	1	4	9	
24 Nitra	0	0	2	1	0	1	0	0	6	10	
25 Bonaero	1	0	3	0	0	6	0	7	11	28	
	68	11	24	49	10	37	27	22	43	291	

¹Ni nomas ilin okazoj, ĉar kelkaj esperantistoj eĉ en la sama jaro trapasis du diversajn ekzamenpartojn en du diversaj sesioj /landoj/eĉ kontinentoj. Do, ne eblas menci simple ke "291 personoj ekzameniĝis", ja tio ne veras.

Entute en la jaro 2014 aliĝis al la ekzamenoj 291 personoj el 31 landoj,
kaj el inter ili sukcesis en la ekzamenoj 259 kandidatoj, sekve malsukcesis 32 kandidatoj.

Jaro: 2014 Ordigi laŭ: personoj											
	B1			B2			C1			Poentoj*	Personoj
	S	P	K	S	P	K	S	P	K		
1. Francujo	6	2	6	5	4	14	6	2	6	154	51
2. Brazilo	5	2	4	3	0	8	0	4	6	101	32
3. Sud-Koreujo	10	0	0	4	0	0	3	2	0	33	19
4. Rusujo	6	0	0	5	0	0	4	1	1	37	17
5. Ĉinujo	9	0	0	8	0	0	0	0	0	25	17
6. Kolombio	2	0	0	6	1	1	4	2	0	38	16
7. Belgujo	0	0	2	0	1	2	0	3	7	65	15
8. Meksiko	5	1	0	1	1	0	1	2	3	37	14
9. Hispanujo	0	1	3	0	2	3	1	0	3	44	13
10. Svislando	2	1	2	1	0	2	0	0	1	23	9
11. Argentino	1	0	0	2	0	0	2	1	2	26	8
12. Japanujo	1	0	0	2	0	0	2	0	1	17	6
13. Usono	1	0	2	0	0	0	0	0	3	23	6
14. Nikaragvo	2	0	1	2	0	0	0	1	0	11	6
15. Nederlando	1	0	0	0	0	0	4	1	0	16	6
16. Slovakujo	0	0	0	1	0	1	0	0	2	17	4
17. Kanado	0	0	1	1	0	0	0	0	1	10	3
18. Ĉeĥujo	0	0	1	0	0	1	0	0	0	6	2
19. Germanujo	0	0	0	0	0	0	0	0	2	12	2
20. Britujo	0	0	0	0	0	1	0	0	1	10	2
21. Rumanujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
22. Hungarujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
23. Italujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
24. Venezuelo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
25. Ĉilio	0	0	1	0	0	0	0	0	0	2	1
26. Domingo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
27. Norvegujo	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
28. Sud-Afriko	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
29. Kubo	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
30. Islando	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
31. Kostariko	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
Entute	51	7	23	41	9	36	27	22	43		
	81			86				92		752	259

Jaro: 2014 Ordigi laŭ: landoj											
	B1			B2			C1			Poentoj*	Personoj
	S	P	K	S	P	K	S	P	K		
1. Argentino	1	0	0	2	0	0	2	1	2	26	8
2. Belgujo	0	0	2	0	1	2	0	3	7	65	15
3. Brazilo	5	2	4	3	0	8	0	4	6	101	32
4. Britujo	0	0	0	0	0	1	0	0	1	10	2
5. Ĉeĥujo	0	0	1	0	0	1	0	0	0	6	2
6. Ĉilio	0	0	1	0	0	0	0	0	0	2	1
7. Ĉinujo	9	0	0	8	0	0	0	0	0	25	17
8. Domingo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
9. Francujo	6	2	6	5	4	14	6	2	6	154	51
10. Germanujo	0	0	0	0	0	0	0	0	2	12	2
11. Hispanujo	0	1	3	0	2	3	1	0	3	44	13
12. Hungarujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
13. Islando	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
14. Italujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
15. Japanujo	1	0	0	2	0	0	2	0	1	17	6
16. Kanado	0	0	1	1	0	0	0	0	1	10	3
17. Kolombio	2	0	0	6	1	1	4	2	0	38	16
18. Kostariko	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
19. Kubo	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
20. Meksiko	5	1	0	1	1	0	1	2	3	37	14
21. Nederlando	1	0	0	0	0	0	4	1	0	16	6
22. Nikaragvo	2	0	1	2	0	0	0	1	0	11	6
23. Norvegujo	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
24. Rumanujo	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
25. Rusujo	6	0	0	5	0	0	4	1	1	37	17
26. Slovakujo	0	0	0	1	0	1	0	0	2	17	4
27. Sud-Afriko	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
28. Sud-Koreujo	10	0	0	4	0	0	3	2	0	33	19
29. Svislando	2	1	2	1	0	2	0	0	1	23	9
30. Usono	1	0	2	0	0	0	0	0	3	23	6
31. Venezuelo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
Entute	51	7	23	41	9	36	27	22	43		
	81			86				92		752	259

*Pretigi statistiko ankaŭ laŭ la valoro de la ekzamenoj. La kalkulado de poentoj okazis tiel, ke la ekzameno laŭ tipoj je B1-nivelo valoras 1, je B2 valoras 2 kaj je C1-nivelo 3 poentojn. Sekve: unu B1 kompleksa valoras 2 poentojn, ktp. <http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=kandidatoj>
 Estas interese, ke francoj – lando, kies landa ekzamsistemo estas la plej riĉa kaj ellaborita – kun tre granda entuziasmo partoprenas la KER-ekzamenojn.

Nesukcesaj ekzamenoj

2014									
	B1S	B1P	B1K	B2S	B2P	B2K	C1S	C1P	C1K
Ekzameniĝis	68	11	24	49	10	37	27	22	43
Sukcese	51	7	23	41	9	36	27	22	43
Fiaskis	17	4	1	8	1	1	0	0	0
Fiaskis %	25%	36%	4%	16%	10%	3%	0%	0%	0%
Laŭnivela mezumo	22%			10%			0%		

La nesukcesaj ekzamenoj koncentriĝas nur je kelkaj lokoj, kie la organizantoj aŭ kursgvidantoj malbone taksis la nivelon, ne konis la postulojn de la ekzamenoj aŭ strebis atingi kiel eble plej grandan nombron de kandidatoj.

Okulfrapas ankaŭ la fakto, ke ĉiam en la plej malalta nivelo estas la plej multe da fiaskoj. Tio kaj en 2013 kaj en 2014 estis 22% en la nivelo B1. Kreskis la nombro je nivelo B2 (kompare kun la pasintjaraj 4%) en 2014 fiaskis 10% de la kandidatoj. C1-niveluloj ĉiam eminentas. Pasintjare nur unu fiaskis, (1%), ĉi-jare neniu.

Laŭ la niveloj estis relativa homogeneco inter la kandidatoj (B1:81, B2:86 kaj C1:92).

Retrorigarde al la pasintaj jaroj, observeblas plia malkresko rilate la nombron de la kandidatoj. La lokoj, kie ni sukcesis okazigi sesiojn kaj ekinteresi la homojn dum la 2-3 jaroj elĉerpis siajn fontojn, trapasigis ekzamenojn al ĉiuj membroj (plurajn eĉ plurfoje je pluraj niveloj) kaj ne sukcesas akiri novajn adeptojn aŭ progresigi la membrojn kaj altigi ilian nivelon por ke ili povu trapasi ekzamenon je pli alta nivelo ol en la antaŭaj jaroj.

	Lando	Sumo
1.	Francio	51
2.	Brazilo	32
3.	Sud-Koreio	19
4-5.	Ĉinio kaj Rusio	17
6.	Kolombio	16
7.	Belgio	15
8.	Meksiko	14
9.	Hispanio	13

Laŭdendas Francio kaj Brazilo, kiuj dekomence estas je la unuaj du lokoj de la listo. Ni tre ĝojas, ke Koreio kaj Ĉinio ekinteresiĝis pri la ekzamenoj kaj danke al la agado de Lee Jungkee kaj Gong Xiaofeng (Arko) ankaŭ en Azio la KER-atestiloj estas dezirataj.

Krom Brazilo pluraj sud- kaj mezamerikaj landoj: Kolombio, Meksiko, Nikaragvo kaj Argentino, kun diverskvanta kandidataro, regule partoprenas en la ekzamenoj.

Novaj eŭropaj ekzamenlandoj estis *Hispanio kaj Belgio*, sed ankoraŭ mankas pluraj landoj en Eŭropo (ekz. en Norvegio, Svedio, Islando, Slovenio, Kroatio, Ĉeĥio, Rumanio,) kie ne montriĝas intereso pri okazigo de ekzameno, aŭ eĉ entute ekzameniĝo en alialandaj sesioj. Analizendas la kialo.

Ripetendas la pasintjara klarigo, laŭ kiu Edukado.net estis ĝis nun preskaŭ la sola varbanto por la ekzamenoj. La fontoj de kandidatoj estis ties membraro, kiu tamen ne kreskas tiom rapide, ke ĉiujare troveblu el tiu cirklo centoj da novaj ekzameniĝontoj.

UEA, ILEI kaj la landaj asocioj devus engaĝiĝi por stimuli la membrojn ekzameniĝi. La landaj sekcioj devus plani okazigon de sesioj en novaj lokoj, por nova publiko. La UEA-estraro, laŭ la strategia plano, devus iom pli stimuli la membraron je ekzameniĝo. Mankas informoj, ligoj, stimuloj en la nova retejo de UEA.

La okazigon de landaj ekzamenoj helpas nun, ke ne nur dum la tutmondaj ekzamenoj, sed ankaŭ dum la memstaraj sesioj - ĉu plene (kiel ekz. en Kalio), ĉu duone, kun ĉeesto de unu ekzamenanto kaj rete ligitaj aliaj (kiel ekz. en Ronda) – eblas multe ŝpari per la ne-vojaĝigo de du komisionanoj, sed ekzemple nur de unu aŭ neniu. Kvankam tiu maniero ebligis ŝpari monon ĉe la organizanta flanko, necesas menci, ke la proceduro de ekzamenoj postulas tiom da precizeco kaj laboro, ke sume estas pli facile vojaĝigi surloken almenaŭ unu komisionanon, ol ĉion fari rete. Kompreneble en kelkaj kazoj, kie tio tute ne eblas, ni ankaŭ estonte pretos je la formoj de reta ekzamenado.

KER-Agendo

En 2014, danke al la financa subteno de UEA, ĉe edukado.net povis konstruiĝi elektronika programo, per kiu eblas faciligi la organizan laboron, duonaŭtomatigi la traktadon de la datumoj de la kandidatoj. La lokaj organizantoj - post individua traktado kaj pretigo - povis labori helpe de reta ekzamenkalendaro, kiu orientigis ilin en la laboro kaj per sia aversistemo ankaŭ zorgis pri tio, ke oni ne forgesu ĝustatempe plenumi la necesajn paŝojn. Kompreneble la homa naturo, eĉ malgraŭ tiaj helpoj, povas kontraŭstari, sed la sistemo plejparte bone funkciis. Ĝi certe multege helpis al la ĉeforganizanto kaj respondeculo Katalin Kovats, kiu planis, reĝisoris la ekzamenojn kaj trejnigis, preparis la kunlaborantojn.



KER-AGENDO de la sesio 2014AR-BONA

Ekzamendato: 2014-08-01

Organizanto 1: Katalin Kovats (Katalin - katalin@ikso.net)

Organizanto 2: Leandro (leandro_abraham - @)

- Normala
- Farita
- Malfruo
- Proksima limdato

I. Preparfazo			
2014-06-02 - 2014-07-10			
1. Elekto, mendo de la ekzamenejo	2014-06-02	Nomo Komenti	Trovita
2. Trovo, kontakto, informado de la GVIDONTO kaj helpanto(j). Sendo de sindevigoj	2014-06-12	Nomoj? Komenti	Sindevigoj senditaj Ĉu?
3. Varbado, aligo de kandidatoj	2014-07-10	Kiom kaj por kiuj niveloj? Komenti	La minimuma nombro aliĝis. Ĉu?
II. Ekzamensemajno			
2014-07-11 - 2014-07-31			
4. Ricevo de la definitiva listo de la kandidatoj	2014-07-11	Komenti	Ricevita Ĉu?
5. Kolektado de la kotizoj	2014-07-11	Sumo? Komenti	Ĉuj pagis Ĉu?
6. Giro de la kotizoj	2014-07-11	Sumo? Kien? Kiu? Komenti	Ĝirita Ĉu?
7. Informmesaĝo por la kandidatoj pri la loko, renkontiĝo, sciindaĵoj	2014-07-18	Komenti	Mesaĝo(j) disiris? Ĉu?
8. Studi la farendaĵojn, spekti la trejnfilmojn	2014-07-18	Komenti	Jes, la filmo spektita, ĉio komprenita. Ĉu?
9. Printado de la aliĝiloj	2014-07-27	Komenti	Jes, la aliĝiloj estas printitaj. Ĉu?

La laboron de Katalin helpis plurdekoj da lokaj organizantoj, ne nur dum la Tutmonda Ekzamentago (pri tio legu pli poste), sed ankaŭ dum la apartaj sesioj, kie senescepte ĉie kun granda atento kaj zorgemo oni subtenis la laboron de la komisionoj. Apartan dankon meritas *Christophe Chazarein*, *Dorota Rodzianko*, *Victor Sole*, *Jannick Huet* pro la bona laboro en la memstaraj sesioj de Greziljono, Nitra kaj Ronda. La kolegoj ankaŭ ĉe ITK, *Márta Kovács*, *Pálma Csiszár*, Enikő Sereghné Zengő kaj la administranto *Csongor Nemoda* meritas nian dankon.

Dum la ekzameno en la komisionoj ĉi-jare laboris 13 akreditigitaj kolegoj.

2014		Zsófia Kóródy	Katalin Kovács	Renato Corsetti	Monika Molnar	Petra Smidélus	Marta Kovács	F. Lo Jacomo	Paulo Nascientes	Sereghné Enikő	Duncan Charters	Kristin Tytgat	Josias Barboza	Ivan Collin (Br)	Sume laboris
1	Antwerpeno BE		1									1			2
2	Florianopolo BR					1	1		1					1	4
3	Cali (CO)		1			1									2
4	Ronda (ES)		1	1	1										3
5	Greziljono							1		1					2
6*	17 vizsgahely		1	1	1	1	1							1	6
7	Nitra (SK)		1		1		1								3
8	Viktoria (CA)		1												1
9	Buenos Aires (AR)		1					1	1		1				4
	helybeni szervező, vizsgaelnök	1	7	1	3	3	3	2	2	1	1	1	1	1	27

A világvizsga alatt 51 segítővel dolgoztunk
<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/tria/helpis>

Baze ITK kaj UEA trejnigis pliajn 15 personojn dum la 5 jaroj, sed manke de okazoj ekzameni aŭ trejniĝi, momente malmultaj el ili kapablas aŭ pretus por estonta ekzamenlaboro. En 2015 okazos sistemaj (re)trejnadoj por ili kaj por kelkaj novaj helpontoj.

Tria Tutmonda Ekzameno

Entute 164 personoj ekzameniĝis el la 175 aliĝintoj en 17 lokoj de 12 landoj

Ilin ni enkalkulis jam en la supre listigitaj nombroj, sed ĉi tie kiel apartan okazon, ni detalas la informojn.

Tiu datumo rilatas nur al la trapasado de la ekzamenoj, ne al la sukcesoj!!!!												
Laŭ la urboj, alfabete												
Urbo	B1S	B1P	B1K	B2S	B2P	B2K	C1S	C1P	C1K	Sume	Poento	Lando
1 Arras	4	0	0	1	1	4	1	0	0	11	27	FR
2 Bogoto	6	0	0	6	0	0	4	0	0	16	30	CO
3 Bonaero (Buenos Aires)	1	0	0	2	0	0	2	0	0	5	11	AR
4 Ĉeboksaro	0	0	0	2	0	0	2	0	0	4	10	RU
5 Den Haag (Hago)	1	0	0	0	0	0	4	0	0	5	13	NL
6 Kuritibo	0	0	1	4	0	3	0	2	1	11	34	BR
7 La Chaux-de-Fonds	2	1	2	1	0	2	0	0	1	9	23	CH
8 Limoĝo	0	1	2	2	0	0	2	0	1	8	21	FR
9 Managvo	2	0	0	2	0	0	0	0	0	4	6	NI
10 Monterrey, Nuevo León	4	0	0	0	0	0	0	0	0	4	4	MX
11 Moskvo	6	0	0	2	0	0	2	0	0	10	16	RU
12 Osaka	1	0	0	2	0	0	2	0	0	5	11	JP
13 Parizo	1	0	0	3	0	0	3	0	0	7	16	FR
14 Seulo	12	0	0	6	0	0	3	0	0	21	33	KR
15 Tecamac	5	3	0	1	2	0	1	1	1	14	26	MX
16 Tianĵin	8	0	0	11	0	0	0	0	0	19	30	CN
17 Zaozhuang	9	0	0	2	0	0	0	0	0	11	13	CN
	62	5	5	47	3	9	26	3	4	164	324	

Dum la *Tria Tutmonda Sesio* ni denove ebligis en 5 lokoj trapasi ankaŭ la parolan parton de la ekzameno. Danke al tio plurdekoj da personoj kompletigis sian jam akiritan atestilon pri la skriba parto kaj ili trapasis ankaŭ la parolan parton. Tiu lokoj estis *La Chaux-de-Fonds*, *Limoĝo*, *Arras* kaj *Tecamaco*, kie jam pasintjare ni okazigis parolajn sesiojn. Nova parolekzamena loko estis *Kuritibo* el Brazilo.

Inter la 17 ekzamenlokoj estis pluraj el la pasintaj jaroj, sed troviĝis ankaŭ 7 novaj urboj, eĉ 3 novaj landoj :

- | | |
|-----------------------|-------------------------|
| 1. Ĉeboksaro el Rusio | 5. Hago el Nederlando |
| 2. Seulo el Koreio | 6. Monterrey el Meksiko |
| 3. Zaozhuang el Ĉinio | 7. Bogoto el Kolombio |
| 4. Tianĵin el Ĉinio | |

Lokoj, kiel *Arras*, *Limoĝo* kaj *Parizo* en Francio, *Tecamaco* en Meksiko, *Kalio* en Kolombio, *La Chaux-de-Fonds* en Svislando, *Moskvo* en Rusio, *Kuritibo* el Brazilo kaj *Bonaero* en Argentino ĝis nun partoprenis ĉiujn tri tutmondajn sesiojn. Gratulojn al ili.

En la 5 retaj parolaj ekzamenoj entute 29 kandidatoj estis ekzamenataj de kvar komisionoj. Kunlaboris *Katalin Kováts* (ĉe 25 kandidatoj), *Petra Smidéliusz* (12), *Márta Kovács* (11), kaj *Zsófia Kóródy* (10). La retaj sesioj pere de Google+ Hangout iris bone.

Tre laŭdindas, ke en la Tutmonda Ekzamentago denove plurdekoj da personoj kunlaboris kun entuziasmo kaj diligento.

Katalin Kováts, ĉeforganizanto, **kore dankas ĉiujn, kiuj iel helpis, kunlaboris en la realigo de la Tria Tutmonda Ekzamentago. Jene estas ilia listo:**

- Sylvain Lelarge* (NL) / provlegado, presado, alpoŝtigo, pakado de la testoj
- Jevgenij Gaus* (DE) programado, KER-agendo
- Petra Smidéliusz* (HU) / organizaj preparoj, provlegado, reta ekzamenado
- Márta Kovács* (HU) / reta ekzamenado
- Zsófia Kóródy* (DE) / reta ekzamenado
- Derek Roff* (US) / kopiado, poŝtigo
- Jose R. Tenorio* (BR) / kopiado, poŝtigo
- Susanna Beglaryan* (FR) / Kasistoj - Esperanto France
- Ralph Schmeits* kaj *Stanka Starcevic* (NL) / UEA-kasistoj
- Leandro T. Abrahão* (BR) / provlegadoj de la AGENDO kaj komunikaĵoj

Lokaj organizantoj, gvidantoj, helpantoj kaj honoraj gastoj de la sesioj

1. Aleksandr Blinov (Ĉeboksaro - RU) 2. Arlette Plutniak (Arras - FR) 3. Cao Baozhu (Tianjin - CN) 4. Claude Longepe (Arras - FR) 5. Daniel Sauvage (Limoĝo - FR) 6. Danielle Carriere (La Chaux-de-Fonds - CH) 7. Didier Janot (Parizo - FR) 8. Didier Loison (Parizo - FR) 9. Didier Touller (Arras - FR) 10. Edmond Plutniak (Arras - FR) 11. Erika Gabriela Juárez Maldonado (Monterrey - MX) 12. Freddy Mendez (Managvo - NI) 13. François LO JACOMO (Parizo - FR) 14. Gong Xiaofeng (Tianjin kaj Zaozhuang - CN) 15. Han Sine (Seulo - KR) 16. Irina Gončarova (Moskvo -RU) 17. Ivan Colling (Kuritibo - BR) 18. Jefferson Alexis Rubio Bohorquez (Bogoto- CO) 19. Julieta García Altamirano (Tecamac - MX) 20. Katja Boen (Arras

FR) 21. Lee Jungkee (Seulo - KR) 22.

Luan Huiqin (Tianjin - CN) 23. Luis Jorge Santos Morales (Bogoto - CO) 24.

Mallely Martínez (Tecamac - MX) 25. Marianne Dunlop (Arras - FR) 26.

Martin Schäffer (Tecamac - MX) 27. Mónica Molnár (La Chaux-de-Fonds - CH) 28.

Nakamiti Tamihiro (Osako - JP) 29. Oki Keimei (Osako - JP) 30.

Petra Smidéliusz (Bonaero - AR) 31. Philippe Kryszak (Limoĝo - FR) 32.

Piet Buijnsters (Hago - NL) 33. Pierre Telle Bouvier (Limoĝo - FR) 34.

Rangel kaj Regis de Castro Gotardi (Kuritibo - BR) 35.

Regina Amelia Darriba Rodríguez (Kuritibo - BR) 36.

Rita de Moraes (Kuritibo - BR) 37.

Tria Tutmonda KER-sesio

Dokumentoj kaj informoj pri la Tria Tutmonda Ekzamentago de majo 2014

por vidi la sekciojn bonvolu klaki sur la fotojn.

La paĝo de la organizantoj estas [ĉi tie](#).

Listo de la organizantoj




Fotoalbumo



Statistikajoj

Urbo	Lando	Aliĝintoj
1 Arras	FR	11
2 Bogoto	CO	14
3 Bonaero (Buenos Aires)	AR	5
4 Ĉeboksaro	RU	4
5 Den Haag (Hago)	NL	5
6 Kuritibo	BR	11
7 La Chaux-de-Fonds	CH	9
8 Limoĝo	FR	8
9 Managvo	NI	4
10 Monterrey, Nuevo León	MX	4
11 MOSKVO	RU	10
12 Osako	JP	5
13 Parizo	FR	7
14 Seulo	KR	21
15 Tecamac	MX	15
16 Tianjin	CN	21
17 Zaozhuang	CN	11
		165

Statistikajoj ekde fino de junio



Sergej Maksimov (Ĉeboksaro - RU) 38. Sun Mingxiao (Zaozhuang - CN) 39. Svetlana Smetanina (Moskvo - RU) 40. Uriel Enoc Gurdian Mendez (Managvo - NI) 41. Wim Jansen (Hago - Nederlando)

La supra paĝo kun ligoj al la subĉapitroj troveblas ĉe: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/tria>

Fotoj: <http://edukado.net/biblioteko/fotoj?al=54>

Listo de kandidatoj – PRI KIUJ NI FIERAS

<http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>

Danke al edukado.net sur la paĝaro kreiĝis surfaco, kie la KER-diplomitoj povas malkaŝi sian nomon, landon kaj nivelon de la trapasita ekzameno. Tiujn datumojn oni bone povas uzi dum pledado por enkonduko de instruado de la lingvo aŭ profesia apliko de Esperanto. La listo kun konkretaj nomoj kaj informoj estas objektiva lingvopolitika pruvo en niaj manoj.

En la baza aranĝo en tiuj paĝoj troveblas la datumoj laŭ la numeroj de la atestiloj, kaj ties posedantoj povas pere de siaj naskiĝdatumoj kaj retadreso identigi sin.

Ĝis la fino de 2014 entute ĉ. 600 personoj montris sin el 1509. Gravus, ke kiel eble plej multaj vizitu la paĝon kaj malkaŝu sin.

Serĉvorto:

Trovitaj: 1-50 el 1508 personoj.

Stato	Atestilo ↓	Familia nomo	Nomo	Lando	Nivelo	Poentoj	Ekzamenjaro
●	00001	ANDREI	Annarosa	IT	B2K	4	2008
●	00002	CLERICI	Ranieri	IT	C1K	6	2008
●	00003	DE RIU	Ugo Alessandro	IT	B2K	4	2008
●	00004	FORKEL	Ingrid	DE	B2K	4	2008
●	00005	GROSSMANN	André	FR	C1K	6	2008
●	00006	-	-	AT	C1K	6	2008
●	00007	NEVES BRANCO	Paulo Antonio	BE	C1K	6	2008
●	00008	-	-	NL	C1K	6	2008
●	00009	-	-	RU	B1P	1	2009
●	00010	-	-	DE	B1P	1	2009

Faciligus la serĉadon la apliko de la serĉkampo, kien la atestilnumeron necesas enskribi kaj post la ENTER-klavoj sekvi la instrukciojn.

Serĉvorto:

Ni petas ĉiujn aprobi en la reto la publikigon de la nomoj.

Emblemo de la KER-ekzamenoj



Ekde la jaro 2014 ni uzas la apudan emblemon de la KER-ekzamenoj, kiu kreiĝis kun modifoj - post internacia konkurso - el la plej populara konkursaĵo.

Ĝin kreis Eder Benedetti el Brazilo.

Ni petas ĉiujn sisteme uzi ĝin en komunikaĵoj kaj reklamoj.

ALTE-rilatoj <http://www.alte.org>

UEA renovigis sian ALTE-membrecon en 2014. Ĉiujare oni devas subskribi kunlaborkontrakton kaj pagi jarkotizon. En 2014 ĉiu membro devis refreŝigi tie informojn pri si. Ni ĝustatempe plenumis tion.

La t.n. Konstanta Komitato de ALTE dum sia kunsido en novembro 2014 konfirmis la membrecon de UEA kaj laŭ tio la kunlaboro estas daŭrigata.



Reta apero

UEA estas daŭre aliĝinta institucia membro kaj aperas sur la ALTE retpaĝaro ĉe http://www.alte.org/membership/alte_institutional_affiliates

ALTE-konferencoj

1) ALTE havis sian 6an Internacian Konferencon en Parizo la 10an kaj 11an de aprilo 2014.

Kiel UEA-representanto ĉeestis Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI.

Ŝia detala raporto kun fotoj aperis en IPR 2014/2. Jen kelkaj partoj el ĝi:

Partoprenis 360 personoj el 60 landoj. La partoprenantoj venis el Japanio, Ĉinio, Tajvano, Sud-Ameriko, Afriko, Kanado. La Komuna Eŭropa Referenckadro ne plu estas eŭropa, ĉar en ĝi estis agnoskitaj la korea lingvo, la ĉina, la japana, la araba kaj Esperanto. Dum la Konferenco prelegis partoprenantoj el 30 landoj en diversaj lingvoj...

“La temo de la Konferenco estis „Taksado pri lingvoj por multlingvismo. Kuraĝigi al lingva diverseco kaj interkultura komunikado”. Enhave la diversaj kontribuoj traktis tiun temon kaj ĉiuj prelegantoj subtenis multlingvecon.

... Mi plurfoje partoprenis debaton per demando aŭ komento, ĉiam post klariga enkonduko: „Mi nomiĝas Mireille GROSJEAN, mi reprezentas Universalan Esperanto-Asocion”. Mi povis disdoni multajn informilojn kaj ekilati kun multaj personoj.

...Mi parolis kun Profesoro NEGISHI el Tokio, kiu prezentis la diversajn aspektojn de la uzo de la KER-sistemo por la taksado de la akiro de la angla en Japanio.

...Mi parolis al li kaj ni skizis, ke iu el lia esplorgupo povus partopreni nian simpozion dum la ILEI-konferenco en Oostende en 2015. Same mi faris kun Profesoro Jozef COLPAERT de la antverpena universitato; li estas fakulo pri perkomputila lernado de lingvoj. Li prelegis pri necesaj adaptoj de la KER-sistemo post konsideroj de uzantoj

2) La 45-a ALTE-konferenco okazis en Trinity College, London, inter 19 - 21 novembro, 2014.

Nome de UEA partoprenis Tim Morley el Britio. Jen kelkaj partoj el lia raporto:

...Mi elektis la "LAMI SIG". Temis pri instruado de lingvoj al migrantoj por helpi la integriĝon en sia nova lando. ..Estis ... malfacile starigi la temon de Esperanto sen deflankigi la diskuton, sed feliĉe mi hazarde sidis apud Michaela (Perlmann-Balme) de la Goethe Instituto, kiu poste gvidis la sesion pri trejnado de instruistoj, do mi povis almenaŭ prezentiĝi kaj mencii Zsófia.

...Estis la sesio pri trejnado de instruistoj. Je la komenco Michaela petis, ke ni konsentu pri la protokolo de la antaŭa rendevuo. ...Poste ŝi mallonge priskribis tion, kio okazis tiam, menciante ke vi prezentis "interesan priskribon" pri via trejnada laboro. Ŝi petis, ke ĉiuj ĉeestantoj sin prezentu; estis ĉ. 15 homoj en la salono...

...Mi menciis "Universal Esperanto Association" ĉiufoje kiam mi prezentis min, sed bedaŭrinde havis malmultajn okazojn plu paroli pri Esperanto. ...Pozitiva afero estas simple, ke UEA/ILEI havis ian reprezentanton ĉeestantan.

Planoj por la jaro 2015

La ekzamenkomisiono ankaŭ por 2015 antaŭvidas plurajn eventojn. Jam nun estas lanĉitaj sesioj:

- en januaro en Brazilo,
- printempe en Greziljono (FR) kaj Brajtono (GB)
- kaj jam tradicie la Kvara Tutmonda Ekzamentago okazos la 17an de majo, denove en pluraj lokoj kun parolaj sesioj.
- Somere grandnombran ekzameniĝon ni antaŭvidas dum la 100-a UK en Lilo, kaj eventuale estos sesio ankaŭ dum SES.

Por ebligi, ke en pli kaj pli da lokoj ni povu organizi parolajn sesiojn, kaj tiuj ne amasiĝu je unu tago dum la Tutmonda Ekzamentago, ni stimulas la lokajn organizantojn elekti unu el la listigitaj ekzamentagoj kaj en tiuj tagoj aliĝi al la sesio. Tiel ekzemple Managvo aliĝis al la greziljona tago kaj tiel ni povos uzi ekonomie la samajn testojn.

La aktualaj sesioj ĉiam videblas en la paĝo, kie aperas ankaŭ la aliĝiloj

<http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Elirante de la ligo, legeblas en la sama paĝo supre la listo de ĉiuj aktualaj sesioj kaj eblas sekvi la nombron de la jam aliĝintoj. Rekta ligo: <http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/aktuale>

Ŝanĝo en la kotizo

Ni anoncas, ke en 2015 iom altiĝos la ekzamenkotizoj por la landoj de la baza kategorio.

La kotizo de parola aŭ skriba sesio en B1-nivelo de 34 eŭroj altiĝos al 35 eŭroj, ĉe B2-nivelo de 37 eŭroj al 40 eŭroj, kaj en C1-nivelo de 42 al 45. La kotizo de la kompleksaj ekzamenoj estos do B1:70, B2:80 kaj C1: 90 eŭroj.

Novaj prezoj ekde la jaro 2015

1. Baza prezlisto valida por la loĝantoj de la landoj:

Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Greklando, Hispanio, Irlando, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Svedio, Svislando kaj Usono

Valida por la aliĝoj ĝis la 31a de januaro 2015.

Nivelo	B1 skriba	B1 parola	B2 skriba	B2 parola	C1 skriba	C1 parola
Prezo	€34	€34	€37	€37	€42	€42

Valida por la aliĝoj kaj pagoj ekde la 1a de februaro 2015

Nivelo	B1 skriba	B1 parola	B2 skriba	B2 parola	C1 skriba	C1 parola
Prezo	€35	€35	€40	€40	€45	€45

Por tiuj, kiuj jam aliĝis aŭ aliĝos al ajna sesio de 2015 kaj pagos sian kotizon ĝis la 1a de februaro, por ili validas ankoraŭ la malnova prezo.

Kotizoj: <http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/kotizoj>

Bona novaĵo estas ke la komisiono eklaboris pri lanĉo de nova nivelo, nome pri A2-nivelo por junuloj, do por lernejoj kun speciala temaro. Pliaj informoj atendeblas dum la jaro.

Katalin Kováts, gvidanto de la ekzamenkomisiono de UEA